

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**136**  
printempo 2024



leĝa depono ĉe BNF  
ISSN 2609-5203

**federacia retejo**  
<http://www.esperanto-provence.org>

**prezidanto**  
Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

**aliĝkotoz (kun la gazeto): 6 €**  
> ĉeko al: Espéranto-Provence  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de P. Oliva)  
> aŭ bankĝiro  
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

**sekretario kaj redaktoro**  
Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°**  
10-a de junio 2024  
bonvolu sendi al la supra retadreso  
><><  
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

## Vorto de la redaktoro

Kio kapablas plej feliĉigi gazetredaktoron? Tutcerte la ricevo de multaj artikoloj kaj fotoj, kaj sekve la foresto de zorgado pri gazetenhavo.

Nu... dankegon al ĉiuj kontribuintoj, kiuj denove igis min feliĉa! Mi ja ricevis plurajn kontribuajojn pri la ĉefa evento de la unua 2024-kvaronjaro: la Mediteranea Esperanto-Semajno. Mi ne forgesas tiujn, kiuj raportis pri aliaj renkontiĝoj kaj eventoj en Esperantujo.

Danke al vi ĉiuj, plu vivas nia gazeto!

*Pascal V.*



**NEŬTRALA LINGVO INTERNACIA**

## enhavo

2	> membro-kunveno	14	> diversajoj
3	> Mediteranea Esperanto-Semajno	17	> ZEO en Nico (2)
11	> FEI-ekzamenoj > el niaj asocioj	18	> nekrologo
13	> vojaĝemaj esperantistoj	20	> agendo

# Federacia agado

## Membro-kunveno

Ĝi okazis dimanĉon la 10-an de marto 2024 en Les Issambres (Var), kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

Ĉeestis 20 membroj kaj 11 sendis sian rajtigilon. Do entute 31 membroj el la 77, kiuj aliĝis al nia federacio en 2023.

Post diskutoj pri la raportoj morala, agada kaj financa (legeblajn en la numero 135 de nia gazeto), la cetero de la kunveno estis dediĉita al decidoj kaj projektoj por la nuna kaj sekva jaroj. Intertempe, vi povis legi pri tio en la protokolo, kiun vi ricevis rete.

Jen tamen kelkaj punktoj de nia membro-kunveno:

### **komitato**

Tri novaj kandidatoj estis unuanime elektitaj: Rosy Inaudi, Vinko Bosnjakovic kaj Philippe Duc Goninaz.

### **kotizo**

Estis decidite plialtigi la aliĝkotizon de 6 al 10 €.

### **ontaj eventoj**

- FEI-ekzamensesio (vidu je paĝo 11)
  - Kultura Semajnfino novembrofine aŭ decembrokomence en La Garde
- Pliajn informojn en la oktobra numero de nia gazeto.
- Mediteranea Esperanto-Semajno de la 15-a ĝis la 22-a de marto 2025.



La komitato de la federacio Esperanto-Provence konsistas nun el 13 membroj. Mankas sur la foto Nicole Lafitte, kiu ne povis ĉeesti en la membro-kunveno pro sanproblemo.

Pri nova estraro decidis la komitato okaze de komitatkunsido okazonta la 10-an de aprilo (do post la publikigo de ĉi tiu gazetnumero).

Vi ekscios pri la novaj estraranoj en la julia numero.

## Mediteranea Esperanto-Semajno

Pluraj partoprenintoj raportis pri la Mediteranea Esperanto-Semajno, kiu okazis en Les Issambres de la 9-a ĝis la 16-a de marto 2024. Egan dankon al ili! (ndlr)

### Liba Gabalda (La Norville - F) pri la 1-a kurso

La komencantojn prizorgis **Rodica Todor** el Rumanio. Ŝi vigle mastris la kurson per varia instruprogramo kaj paroligis la lernantojn.

(tre kompletan raporton de Liba pri la tuta staĝo vi malkovros en la paĝoj 6, 7 kaj 8)



### Marica Bosnjakovic

(Les Arcs-sur-Argens, F)  
pri la 2-a kurso

Kun mia edzo, mi ĉeestis kurson je la 2-a nivelo, gvidata de **Szilva Szabolcs (Sabi)**, pola instruisto (hungardevena). Dum la tuta semajno, ni lernis serioze nian ŝatatan lingvon. Nia instruisto klarigis bone, do je la fino de la semajno gramatiko iris pli glate por ni.



### Denise Happi-Fosso (Paris - F) pri la 3-a kurso

La kurso de **Mireille Grosjean** temis pri Afriko. Tion mi elektis, ne nur pro la fakto ke mi jam marŝis sur la afrika tero, sed ankaŭ por lerni pli profunde pri tiu ampleksa kontinento. Ŝi certe multe laboris antaŭe por trovi taŭgajn informojn pri landoj, prezidentoj... Ni eĉ lernis kanzonojn en la svahila lingvo, kiujn ni kantis okaze de la lasta vespero. Ege interesaj sciindaĵoj! Dankon al Mireille pro ŝiaj donitaj konoj.



## Eŭheno Kovtoniuk (Ukrainio) *pri la tuta staĝo*

La unua fojo ĉiam estas la unua fojo.  
Mi ĝojis senti tion.

Ĉiam estas interese, nove kaj esperige,  
aparte se eblas kompari kun io simila.

Ĉe la lazura maro kun suna bondezira  
etoso de gajaj, humuraj, plejparte ma-  
turaj - en ĉiuj sencoj - partoprenintoj  
okazis Mediteranea Esperanto-Semaj-  
no.



Allogis abunda ne deviga programo kun  
ebleco ripozi kaj ĝui aliojn.

Utilecojn partoprenintoj elektis mem.  
Iu pli komprenis uzojn de IG kaj IĜ, iu  
de INT, ANT kaj ONT, iuj pliprofundigis  
kun senlaca Mirejo en la historion de  
Afriko, iuj ekkomencis paroli Esperant-  
on.

*"... malantaŭ la kurtenoj  
senlace laboregis  
organiza teamo..."*



Ĉiu kontentigis siajn bezonon kaj gust-  
on. Ĉiuj prelegoj estis bonkvalite prepar-  
itaj kaj emocie prezentitaj. Aparte de  
Rodica Todor: "Drakula, historio kaj le-  
gendoj" kaj de Szabolcs Szilva: "Familiaj  
arboj".

Ĵaŭde vespere, niaj okuloj brilis pro ruĝaj  
vestoj de dancantaj esperantistoj kaj ne.  
Gaje kaj amuze la hotelo organizis tiun  
ruĝan feston. Plezure geĵeris energion  
de junaj kaj ne tre, niaj samideanoj.

Dum kafopaŭzoj modeste kaj ĝenti-  
le ĉarmaj provencaj esperantistinoj re-  
galis nin per bongustaj bakaĵoj kaj  
trinkaĵoj.

Grandan intereson vekis la artikolo pri  
MES en loka gazeto.

Mi ŝatis ĉion: organizadon, nivelon, loĝ-  
adon, manĝaĵon, instruadon, lernadon  
kaj freŝigantan veteron.

Pro tio mi ekkantis al la publiko la trian  
fojon en la vivo kaj planas viziti MES  
2025.

Mi certe komprenas, ke antaŭ kaj aparte  
malantaŭ la kurtenoj senlace laboregis  
organiza teamo. Dankegon!

Amike al ĉiuj legantoj.



## Edmond Plutniak (Arras - F)

### **pri la ekskurso al Grasse, mondfama ĉefurbo de parfumoj.**

Ĉiuj akurate enbusiĝis merkrede post-tagmeze por la vizito sub amika suno.

Renée Triolle profesie ĉiĉeronis nian grupon, ne tro parolante por ke ni povu plene ĝui la belegajn pejzaĝojn. Tamen la plej gravajn traveturitajn lokojn ŝi koncize kaj agrable komentariis per interesaj kulturaj informoj.

Rapide ni alvenis al la parfumejo *Fragonard*, kie atendis nin ĉarma kaj kompetenta gvidistino, kiu klarigis al ni ĉiujn sekretojn de la kreado kaj komercado de parfumoj. Ŝi ankaŭ tre afable respondis al la multnombraj demandoj de nia grupo. Renée perfekte tradukis la tuton.

Grava profesio en tiu fako nomiĝas franclingve «*le nez*» (ĉu la nazisto?).

En Francio nur tri fakaj lernejoj por tiu profesio: du jaroj de intensiva studado kaj sep plenaj jaroj de praktikado por fine ricevi la valoran diplomon.

La profesio estas bone pagata.

La esperantistoj estas bonaj aĉetantoj, preskaŭ ĉiuj revenis kun buntaj pakaĵoj. Bonodoris en la buso! Sur la revenvojo, Renée trafite atentigis nin pri la butikoj «*La tarte Tropézienne*» (tute proksima de nia bela hotelo), kie oni povas gustumi la neforgeseblan mirindan kukon ellaboritan de poldevena panisto, *Alexandre Micka*, en 1955, dum la farado de la filmo «*Et Dieu créa la Femme*», kiu mondfamigis la junan *Brigitte Bardot*.

Kiam vi revenos venontjare al MES, nepre ne forgesu gustumi tiun mirindaĵon (mi povos akompani vin!).

### **kelkaj aliaj memoraĵoj**



*Provencanoj en la restoracio por la tagmeza manĝo.*



*kunveno de legantoj de la revuo *Espéranto-info**



De la 9-a ĝis la 16-a de marto okazis en la bela hotelo Miléade en Les Issambres, en suda Francio, la jam bone konata Mediteranea Esperanto-Semajno (MES).

Novan torĉon transprenis la Provenca Esperanto-Federacio. Organiza teamo konsistis el la entuziasmaj esperantistoj Thierry Spanjard, Renée Triolle, Marc Gallardo kaj Rosy Inaudi.

La staĝon partoprenis okdek geesperantistoj el dek landoj. Post la alveno, sabate posttagmeze, nin akceptis la organizantoj, kiuj disdonis al ni la necesajn materialojn. Renée tre bone majstris la aranĝon disdonante aktualajn informojn al la ĉeestantoj.

Ĉe la antaŭvespera kunveneto nin bonvenigis la hotelestro s-ro Jean-Luc Helias. Li prezentis al ni la skipon, zorgontan pri nia bonfarto. Poste li parolis pri la historio de la hotelo kaj invitis nin al solena aperitivo. Post bongusta vespermanĝo, Renée Triolle prezentis la novajn organizantojn. La kursgvidantoj sin mem prezentis. Dimanĉe posttagmeze okazis membro-kunveno de Espéranto-Provence.

Okazis tri diversnivelaj Esperanto-kursoj. La komencantojn prizorgis Rodica Todor el Rumanio. Ŝi vigle mastris la kurson per varia instruprogramo kaj paroligis la lernantojn. Pri progresantoj okupiĝis Szilva Szabolcs (Sabi), hungaro loĝanta en Pollando. Li instruis laŭ sia

metodo uzante komputilon. En la kurso por fluparolantoj, Mireille Grosjean donis multajn utilajn informojn pri Afriko, akompanatajn de bildoj, kio povis instigi iujn al partopreno en la ĉi-jara UK en Tanzanio. La menciitaj kursoj okazis antaŭ la tagmezo kaj antaŭ la vespermanĝo. Posttagmezoj estis liberaj, do la ĉeestantoj povis profiti promenojn en la ĉirkaŭaĵo, ludi kartojn aŭ elpensi aliajn ludojn kaj aktivaĵojn. Ankaŭ la hotelo proponis diversajn programerojn, en kiuj oni povis partopreni. Antaŭ la posttagmeza E-kurso, al la programo estis aldonitaj diversaj prelegetoj.

Ni povis ekscii pri la unua inventisto de la fotografio, Nicéphore Niépce, naskiĝinta en Chalon-sur-Saône en la jaro 1765-a.

El informo pri Ruando, indiĝenoj perdas sian vivmanieron nome de natura konservado. Ekestis demando: "Kiujn protekti, ĉu homojn ĉu bestojn?"

De Nina Korjenievskaya ni ricevis informojn pri la rusa urbo Ufa.

La lasta prezento temis pri neceso arĥivi esperantaĵojn.

Dum la matenaj paŭzoj, Monique Prezioso kaj Simone Marlier prizorgis servadon de kafo kaj teo. Funkciis ankaŭ libroservo kaj eblis trarigardi la fotoalbumojn de diversaj E-eventoj. En la loka gazeto "Var-matin" aperis sur tuta paĝo komuna foto kun artikolo pri Esperanto mencianta nian staĝon.

Merkrede posttagmeze estis planita vizito al la mondkonata parfumejo "Fragonard" en la urbo Grasse. Dum la gvidata vizito, ni ricevis informojn pri la procedo produkti parfumojn kaj ni povis flari diversspecajn floresencojn. En la vendejo eblis aĉeti diversajn parfumojn, parfumitajn sapojn, kandelojn kaj aliajn kosmetikaĵojn.

Ankaŭ vesperaj programeroj estis interesaj. Dimanĉe, Mirejo prezentis la historion de Afriko kaj la filmon Bamako. Lunde, ni povis sekvi la legendon kaj la historion de Drakulo prezentitajn de Rodica. Marde, Sabi parolis pri "familiaj" arboj kaj instruis nin pri geneologio. Merkrede, post la ekskurso, Mirejo prezentis kelkajn mallongajn filmetojn pri Afriko kaj vespere Eŭheno Kovtoniuk parolis pri la reala situacio en Ukrainio. Li prezentis diversajn aspektojn, spertojn kaj proprajn pensojn. Ĵaŭde ni ruĝe vestitaj partoprenis komunan dancvesperon.

### Renée Triolle

#### Daŭrigo kaj ŝanĝoj

De 2010, la grupo de Saint-Raphaël, sub gvidado de Christine Graissaguel, majstre organizis MES.

Ĉi-jare, nova skipo transprenis la torĉon (nur la kafopaŭzo restis prizorgita de Monique kaj Simone, kiel antaŭe) kaj ni aŭdis dekfoje tage: "Ni kutimis...", "Antaŭe ...", "Dum antaŭaj sesioj...", "Kutime ...". Bone, ke la aranĝo fariĝis kutima por pluraj, kiuj revenas sole aŭ

La lasta vespero estis dediĉita al programeroj de la partoprenantoj. Ni ĝuis kelkajn teatraĵetojn, skeĉojn, deklamadojn de poemoj, kantojn, ŝercojn. Poste oni gratulis kaj pridonacis la organizintojn kaj la kursgvidintojn. Ĉiuj meritas korajn dankojn pro la bone preparita semajno kun bunta programo kaj profunda studado. Post la muziko de Josiane, Yannick kaj Marithé, sekvis dancado.

Ĉe la alveno pluvis, sed rapide la vetero ŝanĝiĝis al plensunaj tagoj, kio ĝojigis nin ĉiujn. En antaŭaj semajnoj oni logis esperantistojn per frazo: "Lazurbordo estas loko kie floras mimozoj". Ĉi-foje ili jam estis forvelkintaj. Venontjare oni verŝajne devos diri: "Bonvenigos vin rozkoloraj florientaj migdalarboj".

La venontjara Mediteranea Esperanto-Semajno okazos ekde la 15-a ĝis la 22-a de marto 2025.

pare por ĝui agrablan etoson en agrabla loko. Ĉar neniu el ni partoprenis antaŭajn sesiojn, ni organizis laŭ niaj ideoj kaj kapabloj: ekz. provizis la homojn per staĝlibreto, redaktita de Thierry Spanjaard (kiu zorgis pri financoj) kun indaj informoj; multaj ne legis kaj faris demandojn, kies respondoj enestas sed la pli multo aprezis kiel atingi la lokon aŭ kien ekskursi.



Rilate la programon pri kiu mi zorgis, aldoniĝis surloke proponoj de partoprenantoj, kiujn ni tre dankas pro la diverseco kaj la kvalito («Nicéphore Niépce, inventinto de foto», far Jocelyne Monneret; «diskuto pri situacio en Ruando, kie prioritatas bestegoj en rezervejoj de kie oni forpuŝas la indiĝenojn», far Roselyne Favier; «Ufa, la urbo de Nina Korĵenevskaja»; kaj «konservi arkivojn», far Claire Mousset). Nia ukraina gasto, Eŭheno Kovtoniuk, prezentis la nunan situacion en Ukrainio kun demando pri la estonto. Dankojn al ili.

Demandilo celas taksu la opinion de la partoprenintoj, ni vidos post la rezultoj, kion ŝanĝi, aldoni aŭ plibonigi.

Pri la kursoj, vi legos apartajn raportojn sed, kiel organizanto, mi ĝojas, ke la kursgvidantoj ne nur plenumis sian "kontrakton" (kurso kaj prelego) sed dum la manĝoj estis je dispono de la homoj, ne tuj malaperis.

Pri la restado, ekskurso kaj rilatoj kun Var-matin, respondecis Marc Gallardo, kiu tre modeste restis malantaŭ la kulisoj, eĉ se lia laboro estis nepre kaj malfacila (pro ŝanĝemaj nombro aŭ deziroj de la gastoj).

Modeste laboris ankaŭ Rosy Inaudi pri ĉiuj aliaj sekretariaj taskoj.

Kiel kutime, la Membro-kunveno de Espéranto-Provence okazis dimanĉe posttagmeze. Alvenis homoj, kiuj nur tagmanĝis sed akre diskutis, ĉefe la financojn. Efektive la raporto ne tre klaris. Mi ŝatus havi la bilancon (kion ni enspezis, kion ni elspezis) eĉ se niaj agadoj reduktiĝas al eldono de gazeto, mastrumado de ttt-ejo kaj organizo de staĝo en La Garde, kaj apartan raporton pri niaj havaĵoj.

Espéranto-Provence havas kaj disponigas al petantoj: munteblan tendon; projekciilon kaj voĉlaŭtigilon, stokitajn ĉe mi en La Ciotat. Krome ĝi havas konton ĉe Espéranto-France (ĉ. 840 €), ŝparlibreton kun la 10 000 € donacitaj de Saint-Raphaël, kiuj kreskis al 11 200 € kun la interezoj; ŝparlibreton kun 4 800 € kaj konton kun kuranta fluo, 55 €.

MES okazos en 2025 de la 15-a ĝis la 22-a de marto, informu viajn geamikojn el Italio, Germanio, Hispanio, ktp. por ke la semajno estu ankoraŭ pli internacia kaj ke la partoprenantoj ne tro krokodilu!



Mediteranea  
Esperanto-semajno

FRÉJUS - SAINT-RAPHAËL - GOLFE DE SAINT-TROPEZ

# Est-Var

JEUDI 14 MARS 2024 - varmatin.com

La Semaine espérantiste méditerranéenne a eu lieu au centre de vacances Miléade des Issambres, à Roquebrune.

Photo: Fred M.



## L'espéranto, trait d'union entre les peuples

Réunissant près de 80 participants, la Semaine espérantiste méditerranéenne, aux Issambres, a permis de nombreux échanges culturels et même des sorties.

**D**epuis le 9 mars dernier, quelque 80 personnes se sont retrouvées au centre de vacances Miléade, aux Issambres, pour un rendez-vous incontournable réunissant des espérantistes de toutes nationalités, à l'occasion du stage annuel organisé par le

club Espéranto Provence. Allemands, Belges, Chinois, Espagnols, Lituaniens, Ukrainiens, Russes et Français se côtoient et échangent sans problème grâce à leur maîtrise de l'espéranto, la langue universelle imaginée et créée par le docteur Louis-Lazare Zamenhof, en 1887, en vue de faciliter les échanges entre les peuples et de contribuer ainsi à pacifier le monde. (lire ci-contre).

### Nombreux échanges

Durant cette Semaine espérantiste méditerranéenne, les pratiquants ont pu s'immerger pleinement dans le maïsonnet de cet idiomme. Outre des cours de perfectionnement ou d'approfondissement auprès d'enseignants venus de Pologne, de Roumanie ou de Suisse, des conférences, des soirées et des visites touristiques ont contribué à multiplier les échanges sur une multitude de sujets. Comme celui des futures élections au

Parlement européen où la liste Europe-Démocrate-Espéranto sera candidate.

« L'espéranto ne résoudra pas tous les problèmes », indique Marc Gallardo, organisateur pour Espéranto Provence, mais il amènera la démocratie en permettant aux Européens de mieux comprendre les enjeux et de mieux se comprendre. »

Présent dans 120 pays sur tous les continents, l'espéranto est à la portée de tous grâce à sa facilité d'apprentissage. « C'est une langue qui n'est étrangère à personne, témoigne Rosy Iuadi d'Espéranto Provence. J'ai pu faire une conférence en espéranto sur les bords rouges après une année d'études. » De quoi connaître les plus récents. Localement, le club propose des cours gratuits à Saint-Raphaël promettant donc de découvrir une nouvelle langue tout en bénéficiant rapidement d'échanges enrichissants.

FRED M.

Plus d'information : [premi@thelmat.com](mailto:premi@thelmat.com)

### Une langue facile à apprendre

N'étant la langue officielle d'aucun État, l'espéranto vise à établir un pont neutre entre cultures. En tant que langue construite, elle n'est généalogiquement rattachée à aucune famille de langues vivantes. Cependant, une part de sa grammaire et l'essentiel de son vocabulaire portent à la rattacher aux langues indo-européennes – bien souvent aux langues romanes. Ce groupe linguistique a constitué le répertoire de base à partir duquel le D Zamenhof a puisé les racines de cette langue. Environ un million de personnes comprennent l'espéranto et le parlent de façon occasionnelle.

### NOUS CONTACTER

**Saint-Raphaël**  
74, rue Jean-Arkard, 83700 Saint-Raphaël.  
Tél. : 04.94.13.33.02  
E-mail : [saint-raphael@nicemat.fr](mailto:saint-raphael@nicemat.fr)

**Saint-Tropez**  
10, place Blanqui, 83900 Saint-Tropez.  
Tél. : 04.94.55.96.10  
E-mail : [agence.st.tropez@nicemat.fr](mailto:agence.st.tropez@nicemat.fr)

**Abonnements et publicité**  
Tél. : 36.63 (prix d'un appel + 0,15 €/min)

## Ekzamenoj de FEI en Marsejlo

Franca Esperanto-Instituto invitas vin kaj viajn lernantojn trapasi la ekzamenojn de la 1-a kaj 2-a gradoj. Regiona sesio okazos **dimanĉon la 23-an de junio 2024** en **Marseille, ĉe CIRA, 50 rue Consolat (Marseille 1er)** - metroo kaj tramhaltejo Réformés, 12 minutojn piede de la stacidomo Saint-Charles.

**Bonvolu aliĝi ĉe Renée Triolle: [triolle.renee@wanadoo](mailto:triolle.renee@wanadoo).**

Vi pagos surloke: 10 € por la 1-a; por la 2-a: 10 € por la gramatika testo + 14 € por la ekzameno.

8.45: bonveniga kafo, aliĝoj

9.00/10.00: unuagrada skriba parto (diktaĵo, demandoj pri mallonga teksto, gramatikaĵoj)

gramatika testo

10.15 /12.15: duagrada skriba parto (resumo de aŭdita teksto, demandoj pri teksto, 300-vorta verkaĵo)

manĝopaŭzo (portu vian piknikon; se ne, multaj eblecoj je 2-minuta piedirado)

13.30: parola parto. 20-minuta preparado kaj 20-minuta ekzameno.

Kuraĝu: la diplomoj estas belaj, formato A4, afiŝeblaj en via koridoro por "reklami" pri Esperanto.

## El la provencaj asocioj

### 13 - Espéranto - La Ciotat

#### Renée Triolle

#### Journée Mondiale de la langue maternelle, le 21 février

Cette journée internationale est organisée par l'UNESCO, qui tire la sonnette d'alarme : environ deux langues disparaissent chaque mois, victimes de la mondialisation qui marginalise les "petites" langues (même le néerlandais a besoin d'une association de défense) sans parler des langues des peuples premiers. Or, *"chaque langue voit le monde d'une manière différente"*, selon Federico Fellini.

L'espéranto, "Robin des bois des lan-

gues", s'associe à cette journée, car comme le dit le poète malgache Jean-Joseph Rabearivelo : *"À travers la diversité culturelle qui doit se nourrir d'un dialogue permanent, sans arrière-pensée, nous sommes riches de nos différences"*. Et la langue internationale permet à chacun de s'ancrer dans sa langue tout en proposant une langue équitable pour les relations entre locuteurs de langues différentes.

En La Ciotat, dekkvin homoj kunvenis por aŭdigi poeziaĵojn en la japana, germana (tri voĉoj aŭdigis "Himnon al ĝojo" de Beethoven laŭ vortoj de Schiller), hispana kaj angla. Eĉ se multaj surstrate parolas en la araba aŭ en afrikaj lingvoj, ni neniam sukcesis venigi ilin.

**Tago de la Gepatra Lingvo**  
 21 februaro 2024  
 UEC  
 HOMAJ RAJTOJ 75  
 Ne estas justeco sen lingvaj rajtoj  
 Per Esperanto ni subtenas ĉiujn gepatrajn lingvojn

Sed respondis nian inviton la regiona kunordiganto de la aramea kaj siriaka lingvoj: li klarigis, ke la armena genocido ne celis nur la armenojn sed pli ĝenerale la kristanojn en tiu monda parto, li eĉ kantis la preĝon "Nia patro"!

Multaj intervenoj akcentis, ke francoj stulte konsideras "progreso" la uzon de la angla dum temas pri submetiĝo al "koloniigo". Ne vane estis decidita la dato de la 21-a de februaro: bengalaj studentoj ribelis, kiam ili devis studi ne en sia lingvo, la bengala, sed en la angla aŭ hinda!

Abunda aperitivo sekvis, kaj la kunveno finiĝis malfrue pro personaj interŝanĝoj!



### **Esperanto-Arbo en La Ciotat (13,) mardon la 23-an de aprilo je la 11a.**

Kadre de la Kampanjo de Unuiĝintaj Nacioj, kiun partoprenas Universala Esperanto-Asocio, la urbo La Ciotat kaj Espéranto - La Ciotat invitas vin planti arbon la 23-an de aprilo je la 11-a en la Solidareca Ĝardeno, avenue Guillaume Dulac. Venu multnombre kun amikoj kaj konatoj.

Ni poste povos kune pikniki.

Pli da detaloj sekvas aŭ informiĝu ĉe [esperanto.laciotat@wanadoo.fr](mailto:esperanto.laciotat@wanadoo.fr)

Dans le cadre de la Campagne des Nations Unies à laquelle s'associe Universala Esperanto-Asocio, la ville de la Ciotat et Espéranto-La Ciotat vous invitent le mardi 23 avril à 11 h pour planter l'Arbre de l'Espéranto au Jardin solidaire, avenue Guillaume Dulac.

Plus de détails:

[esperanto.laciotat@wanadoo.fr](mailto:esperanto.laciotat@wanadoo.fr)



## Vojaĝemaj Provencanoj... kaj eksterprovencaj samideanoj...

La ĵurnalo *Ouest-France* aperigis artikolon, la 25-an de marto 2024, pri prelego de Renée Triolle en Hérrouville-Saint-Clair.

### Hérrouville-Saint-Clair. Une conférence de Renée Triolle sur l'espéranto

L'association Hérrouville-espéranto organise plusieurs événements pour fêter son 40-e anniversaire. Une conférence à la bibliothèque, vendredi soir, a réuni une cinquantaine de personnes. Elle était donnée par Renée Triolle, directrice des examens de l'Institut français d'espéranto, professeure de russe et ex-vice-présidente de l'Association universelle d'espéranto qu'elle a représentée à l'Unesco (Organisation des nations unies pour l'éducation, la science et la culture).

Renée Triolle s'est appuyée sur la thèse de l'historien allemand Ulrich Lins, «L'espéranto : langue dangereuse ?» qu'elle a contribué à traduire en français. Depuis sa création en 1887 par Louis Lazare Zamenhof, cette langue s'est rapidement développée, «comme un moyen de mettre les gens sur un pied d'égalité en communiquant librement, ce qui n'est pas du goût des dictateurs, notamment Hitler et Staline. De nombreux espérantistes ont été envoyés au goulag et en camps de concentration». La conférencière a expliqué «la facilité d'apprentissage de l'espéranto, langue équitable, parlée par environ trois millions de personnes dans 120 pays, ce qui en fait l'une des trente langues les plus parlées dans le monde.»

*ndlr: Renée prelegis pri la sama temo, ĵaŭdon la 11-an de januaro, en Relais Peyresc, en Tulono. Ĉeestis 16 personoj.*

### Thierry Spanjaard

#### La Pasporta Servo funkcias!

Gastigontoj listigitaj en la Pasporta Servo kelkfoje plendas, ke ili akceptas ne sufiĉe da gastoj... Kaj kelkfoje estas pluraj petoj en mallonga tempo.

Komence de ĉi tiu jaro, mi havis la plezuron gastigi du homojn sinsekve:

Unue venis **Georgos Jurobola, el Brazilo**. Li estas aktoro, tradukisto, filmisto, ktp.



Li jam vizitis ĉiujn landojn en Latina Ameriko, kaj komencis sian Eŭropan malkovron. Li surteriĝis en Lisbono, poste vizitis Nicon kaj alvenis en Marsejlo. Ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam... petveturante. En Marsejlo, li havis oportunecon viziti la urbon, malkovri la francan manĝmanieron, kaj eĉ piediri kaj naĝi en naturista fjordeto, spertante malvarman marakvon.

Tuj poste alvenis **Frédéric Neyret, franco de Chalon-sur-Saône**, kiu vojaĝas bicikle. Li haltis en Marsejlo survoje inter Korusa Staĝo ĉe Pireneoj kaj la Mediteranea Esperanto-Semajno. Li havis tempon viziti Marsejlon kaj ĝiajn muzeojn kaj ankaŭ gustumi lokajn specialaĵojn. (ndlr: Post MES, Frédéric gastis en Lorgues ĉe Cathy kaj Jeff Cousineau, de sabate ĝis marde.)


Ĉiam estas ĝojo gastigi vizitantojn dank' al la Pasporta Servo kaj remalkovri sian propran ĉirkaŭaĵon per novaj okuloj.



foriro el Lorgues

## Diversaĵoj

### Aperos baldaŭ nova verko: "La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj"



*La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj*  
(3 volumoj).  
Esperantigis  
Daniel Moirand  
(Espéranto-France,  
2024).  
ISBN  
9782957896158  
Serio Oriento-  
Okcidento n° 63.

La historia eldonserio Oriento-Okcidento, aŭspiciata de UEA, en Konsulta Partnereco kun Unesko, pliriĉiĝis per nova titolo: "**La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj**" (en 3 volumoj).

**Daniel Moirand** faris la tradukon en Esperanton el la libro "Les mille et une nuits : contes arabes", kiun antaŭ 320 jaroj Antoine Galland preparis en la franca kaj publikigis, en 1704. [...] Entute la traduko en Esperanton enhavos ĉirkaŭ 1 500 ĝis 1 600 paĝojn en A5-formato. [...] Ĉar la verko estas ampleksa, la libro estos publigikita en 3 volumoj. [...]

Espéranto-France planas publikigi la libron en aprilo 2024 kaj prezenti ĝin okaze de la Eŭropa Esperanto-Kongreso, en Strasburgo, de la 8-a ĝis la 12-a de majo 2024. [...]

Ĉiel ajn laŭplane la libro ankaŭ estos disponebla en la Libroservo de UEA. Sekvu informojn pri tio en la rubriko "Laste aperis".

(laŭ informo de UEA)

## Pri «iste, in, ien...»

Estas interese konstati, ke pluraj adjektivoj kreĝis en la franca lingvo laŭ la originala radiko **espéranto**.

Se ŝajnis normale, en Francio, krei la substantivojn «espérantisme» por la Esperanto-movado kaj «espérantiste» por ties ano, ekestis pli da hezito, fine de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a, pri la adjektivo por io, kio rilatas kun la lingvo.

Ĉu «**espérantiste**», «**espérantin**», «**espérantien**»... ?

Cetere, ni plu hezitas en Francio, kiam temas pri kreado de substantivo kaj adjektivo surbaze de prezidenta nomo.

Nia lingvo havas ja:

«gaullisme», «gaulliste» kaj «gaullien»  
«pompidolisme», «pompidolien» (sed ĉu «pompidoliste»?)

«giscardisme», «giscardien» (sed ĉu «giscardiste»?)

«miterrandisme», «miterrandiste» kaj «miterrandien»

«chiraquisme», «chiraquien» (sed ĉu «chiraquiste»?)

«sarkozysme», «sarkozyste» kaj «sarkozyen»

«hollandisme», «hollandiste» kaj «hollandien»

«macronisme», «macroniste» kaj «macronien»

La problemo ne estas nova... mi povus paroli ankaŭ pri la vortoj «papiste», «calviniste»... sed «luthérien»...

Verŝajne estas nuancoj inter la sufiksoj «iste» kaj «ien»... sed mi ne pritraktos ilin nun kaj ĉi tie.

Mi prefere revenu al la franclingvaj derivajoj de «espéranto».

Jen kion mi hazarde trovis:

*Revue Espéranto – n° 4 – 30 juillet 1905*  
Charles Lambert

*« Cependant, que le lecteur veuille bien se reporter au jugement de l'honorable député sur la composition du vocabulaire **espérantin**... »*

Sed en la sama revuo, sampaĝe iom supre:

*« La commission a pris connaissance non seulement des échantillons d'espéranto joints à la pétition, mais encore de toute la littérature **espérantiste** qu'elle a pu se procurer. »*

*Revue Espéranto – n° 5 – 6 août 1905*  
Charles Lambert

*« ... les revues **espérantines**... »*

*« ... l'unité **espérantine**... »*

*« ... une sorte d'argot **espérantin**... »*

*« ... la bonne semence **espérantine**... »*

sed

*« le mouvement **espérantiste**... »*

*« une exposition **espérantiste**... »*

Revue *Esperanto* – n° 6 – 27 août 1905  
«... la partie **esperantine** du journal..»

*Heroldo Komunikas (HeKo 689 3-B, 3 sep 2018)*

«... verko de G. Silfer kaj M-F. Conde Rey "Bref aperçu de l'histoire culturelle de la communauté espérantophone et du peuple **espérantien**" (2019).

Cetere, la franca tradulo de «Esperanta Civito» estas «**Cité Espérantienne**».

Se certe malaperis definitive la sufikson «-in» de «**espérantin**», plu restas kaj estas vaste uzata la «-iste» de «**espérantiste**», dum provas enradikiĝi la «-ien» de «**espérantien**».

Decidas pri vivo aŭ forpaso de neologismoj la ĉiutagaj uzantoj de nia internacia lingvo.

### Bilde-vorte...

Mi havas neniun konon pri numerscienco, pri numbersimboliko.

Sed mi rimarkis, ke la cifero 7 aparte gravas.

Ĉiuj cetere konas:

la 7 semajnotagojn,

la 7 ĉefpekojn,

la 7 katolikaj virtojn,

la 7 sakramentojn,

la 7 nanojn de Neĝulino,

la 7 familiojn de la kartludo,

la 7-leŭgajn botojn,

la 7 mondmirindaĵojn

la 7 muziktononomojn

la 7 ĉielarkajn kolorojn...

kaj ankaŭ la filmojn:

"La 7 samurajoj",

"La 7 solduloj"...

kaj vi, esperantistoj, bone konas:

la 7 regulojn de via lingvo... (ha ne!... ili estas 16!)



*iam fotita de mi  
en Antibes*

Ĉu vi pensas pri alia uzo de 7 en konata(j) esprimo(j)?

Nu... eblas nun aldoni al ĉi tiu listo: **la 7 manekenojn de Antibes**.

Kial tiu ofta uzo de la cifero 7?

Mi lasas vin enketi...

Se taŭgan respondon vi jam konas... aŭ trovos... ne hezitu ĝin sendi al mi.





Personecoj

A	D	E	T	H	O	N	E	S	T	A
K	L	E	R	A	S	Ĵ	V	R	A	Ĝ
R	R	Ĉ	H	S	E	N	U	E	L	A
U	A	E	Z	T	V	D	O	G	E	R
E	T	Ŭ	E	E	E	L	J	E	D	U
L	N	H	A	M	R	A	Ĉ	M	I	K
A	A	A	A	A	A	L	B	A	F	A
A	G	M	I	F	A	T	I	R	P	S
B	E	U	Ĥ	V	J	C	D	E	C	A
U	L	Z	U	T	A	M	E	B	U	D
B	E	A	P	R	G	R	A	C	I	A

ĈARMA  
RACIA  
HASTEMA  
GAJA  
TRUDEMA  
DUBEMA  
FIDELA  
HONESTA  
KURAĜA  
KLERA  
KREEMA  
SPRITA  
NAIVA  
AFABLA  
AMUZA  
REGEMA  
DECA  
BUBA  
TEDA  
KRUELA  
SEVERA  
ELEGANTA  
GRACIA



LUDIGA  
LUNDO

ZEO-j en Regiono «SUD / PACA» > 13 – Nice (06) / sekvo

En la antaŭa n°135 de nia gazeto, mi skribis pri Skvaro Zamenhof, en Nico, kiu ne plu ekzistas.

Sekve de tiu artikolo, mi ricevis de Jean-François Cousineau, iama prezidanto de la Nica Esperanto-Klubo, foton kiu datiĝas de 1989. Ĝi montras ke supozeble la tieaj esperantistoj kutimis kuniĝi ĉe la stratŝildo de la skvaro, ekz. por la Zamenhof-festo, kiel okazas ankoraŭ nun en Saint-Raphaël.



De maldekstre dekstren:

Jean-F Cousineau  
kun malantaŭ li  
Michel Cavelan,  
J-Pierre Cavelan,  
nepino kaj filino  
de Assunta Lotto,  
Robert kaj  
Cécile Llorens



Malfacilas trovi spurojn pri la iama Esperanta vivo en Nico. Serĉado en la reto plejofte montras foton de karnavala ĉaro okaze de la Nica karnavalo en 1909.

## Nekrologo



*majo 2012  
Le Dramont  
en Saint-Raphaël*



*julio 2012  
Les Issambres*

Kutime, nekrologa artikolo sciigas pri freŝdata forpaso de samideano.


Nu... ĉifoje mi ege malfruas por anonci la morton de nia amikino **Rose-Marie Gouverneur-Bourgois**, 95-jara, la 29-an de januaro... **2021**... en Cannes, kie ŝi vivis en maljunulejo. Antaŭ tio, ŝi loĝis en Saint-Raphaël kaj estis membro de la tiea Esperanto-klubo.

Mi enketis pri ŝi, ĉar revenis al la sidejo de Espéranto-Provence la lasta numero de nia gazeto sendita al ŝi. Deĵorantino de la maljunulejo, kiu laboras tie jam de du jaroj, responde al mia demando, diris ke ŝi neniam aŭdis pri iu S-ino Gouverneur. Mi do plu serĉis en la reto kaj trovis nekrologon pri ŝi.

Rose-Marie estis la fratino de Lucien Bourgois, iama prezidanto de la Norda Esperanto-Federacio, konata ankaŭ kiel aŭtoro de valoraj verkoj: "Esprimaro Esperanta-Franca", "Proverbaro Franca-Esperanta", "Kvarlingva Proverbaro" kaj "Laŭ la fluo de l' interparolo".

En la antaŭa numero de nia gazeto, mi sciigis vin pri la forpaso de **Charles Carrey**, la 25-an de decembro 2023, en Hyères.

Charles kaj lia edzino Simone, veninte el la Perigorda regiono, instaligis en Hyères en la printempo 2019, samepoke kiel Mari-Roza kaj mi. Kvar novaj esperantistoj en la sama urbo: tio estis taŭga bazo por iniciati Esperanto-kafejon, kiu unue kunvenis en septembro 2019.



Charles Carrey ne tre aktivis sine de la Esperanto-movado, sed ŝategis verki kaj traduki. Li estas konata de la legantaro de **La KancerKliniko** kiel kunlaboranto de la revuo sub la pseŭdonimo **Ŝarl-Erik d'Arroy**.

*Ĵak Le Puil, ĉefredaktoro de La KancerKliniko, sendis la jenan mesaĝon:*

"LKK perdis du kunlaborantojn! Roger Siarri, kiun ni konis dank' al Charles Carrey, kaj Charles Carrey, kiu donis multajn tradukojn al LKK. Kun li ni konatiĝis okaze de loka kongreso en Orval antaŭ preskaŭ 50 jaroj. Cetere, en la venontaj numeroj de LKK, vi povos legi la daŭrigon de lia traduko "La Kato" de Jean-Louis Hue."

### **"La Kato - Laŭ ĉiuj ĝiaj statoj" - Jean-Louis Hue - traduko de Ŝarl-Erik d'Arroy aperinta en La KancerKliniko n°180 Oktobro/Novembro/Decembro 2021**

Katon oni ekvidas, sude, dum printempaj noktoj. Kvindeko da steloj, etaj kiel puloj, pikas ĝian silueton. Ĝi kaŭras je horizonto malsupre en la ronda subtegmento, kie la homoj vartas luman bestaron kun du ursinoj, granda kaj eta, lupo, virbovo, baleno, leporo kaj eĉ kun kameleono ĉi-foje videbla kaj kaptita.

Stelaro «Kato» malrapide glitas okcidenten dum la sezono. Ĉiele, kiel surtere, kato fuĝas. Poste ĝi revenas.

Tiu fojon necesos ĝin atendi dum preskaŭ unu jaro.

Tiu ĉiela besto nomiĝas kiel la astronomo, kiu ĝin malkovris iom antaŭ 1800. La Kato de Lalande.

Neniu ekpensu, ke Ĵosef Ĵerom Lalande amegis la katojn. Li estis nur ĉasisto pri steloj. Li revis al sia propra ĉasaĵo. Li traserĉis la spacon per sia lorno, trovis novajn stelojn, ilin katenis per reto da koordinatoj, kaj ilin sendis al germana kolego, iu Herr Bode, kiu ilin najlis sur sia propra atlaso.

Lumigi la ĉielon de aliulo, tio lacigas. Lalande, kiu jam arigis pli ol dekdu mil stelojn, blujajn kaj flavajn, gigantajn kaj nanajn, tute junajn kaj mortantajn, deziris famiĝi.

stelojn, blujajn kaj flavajn, gigantajn kaj nanajn, tute junajn kaj mortantajn, deziris famiĝi. Li skuadintus ĉielon kaj teron. Li kreis literaturan societeton en Bourg-en-Bresse, vojaĝis per balono, antaŭdiris pri la reveno de Halley-kometo, timegigis Parizon per anonco pri planeda enkarambolo, kaj li gvidis kampanjon por ekzorci la timon pri araneoj. Li eĉ manĝis kelkajn publike. Sed gloro ne venas dank' al insekto. Tiam Lalande decidis plenigi la vakuojn de ĉielo kaj proponis al sia Herr Bode kunmetadojn da steloj, novajn konstelaciojn. Li kreis la Gutenbergan Presilon kaj la Montgolfieran Globon. Bode ilin akceptis kaj najlis sur sia atlaso. Lalande daŭre estis malkontenta. Li estis hisinta maŝinojn en la ĉielon, lia portista ŝultrolarĝo imponis. Li deziris al si pli romantikan profilon. Hazarde de poemo, li fine trovis sian feliĉan okazon, jen kato. Tiam, elektante pulvon da steloj, li lumigis angulon de la nokto, tiel etan kiel kuseno kaj tie lokis la beston. «Jam estis tridek tri bestoj en la ĉielo. Mi metis tridekkvaran.», li triumfe skribis en sia Astronoma Bibliografio.



## À noter sur votre agenda

### dans notre fédération

*Plusieurs cafés linguistiques "espéranto" :*

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)**

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

*infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

**dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)**

bar de l'hôtel Ibis-Gare - 45 rue Edith Cavell (face à la gare)

*infos : Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

**dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)**

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

*infos : Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

**avril 23 - La Ciotat (13) :** Plantation d'un Arbre de l'espéranto

*infos: [esperanto.laciotat@wanadoo.fr](mailto:esperanto.laciotat@wanadoo.fr)*

**novembre/ décembre** (date à confirmer) - **La Garde (83)**

Fin de semaine culturelle

**mars 2025 - 15-22 - Les Issambres (83)**

Mediterranea Esperanto-Semajno

### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

<http://gresillon.org/?lang=fr>

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

<http://www.kvinpetalo.org>

**mai 8-12 - Strasbourg :** Congrès européen d'espéranto, organisé par Espéranto-France et Espéranto-Strasbourg

<https://esperanto-france.org/congres-europeen-2024?lang=fr>

### ailleurs en Europe et dans le monde

**juillet 20-27 - Maceió (Brésil) :** 57e Congrès International de l'Éducation - Eo ILEI.

<https://2024.kongreso.org>

**août 3-10 - Arusha (Tanzanie) :** 109e Congrès mondial d'espéranto

<https://uk.esperanto.net/2024>

**août 5-11 - Oporto (Portugal) :** 93e Congrès de SAT

<https://sat2024.porto.esperanto.pt/>

**août 24-31 - Montecatini Terme (Italie) :** 90e Congrès italien d'espéranto

<https://kongreso.esperanto.it/90/>